


Detalaĵo en la
Panoramujo en
Wittenberg:
Marteno Lutero
klarigas surstrate
kontraŭ la indul-
genco.

Fotis Karl Heinz
Schaeffer dum la
Bibliaj tagoj. Legu pli
sur paĝo 45



Grupo de
komencantoj, kiun
Mark Starrs
instruas (staranta)

Fotis Pavel Polnický
dum sia vizito en
Tajlando. Legu pli sur
paĝo 44

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

La kvar "kaj"	27
Kiel mi nomu vin?	29
Dio en la Hussein najbaraĵo	30
Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas?	33
Protestantismoj	38
Martn Luther preĝas novan kulturan lingvon	42
Vizito en Tajlando	44
Retrorigardo al Bibliaj tagoj 2017	45
Kongresa partoprenlisto	46
Nekrologo	47
Kanto: Ho Eternul', profunda ĝoj'	48

Redaktoraj vortoj

En ĉi-tiu numero vi denove trovos plurajn artikolojn pri la reformacio. Interesa kaj klariga estas tiu de József Farkas pri la kvar "kaj", kiuj lumigas la reformaciajn "sole". La daŭrigata historia trarigardo de Philippe Cousson, pri protestantismoj, montras la tiutempan kompleksan bildon pri reformatoroj kaj posteuloj. Kelkaj, por mi, novaj personoj aperas, kaj tio instigas al pli da legado. Interesa por ni lingvemuloj estas ankaŭ la artikolo pri la lingvo kiun Luther uzis por sia biblia traduko.

Vilĉjo Goldsmith, per sia tradukita artikolo, montras imponan agadon de homoj, kiuj pro sia kredo kaj amo laboras por helpi siriaj infanoj. Krome vi trovas kelkajn raportojn kaj ankaŭ prelegon de Siegfried Krüger pri pasintjara temo, ĉu vi komprenas tion kion vi legas.

Mi esperas ke vi trovos la gazeton interesa kaj leginda, kiel kutime.

La kvar “kaj”

József FARKAS, hungara protestanta pastoro (1914-1999)

Tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

Sola scriptura
Sola fide
Sola gratia
Solus Christus

La purigadan servon de la reformatoroj eblas tiel sumigi: ili batalis kontraŭ “kaj”. Kvarfoje ili trastrekis kaj malvalidigis tiun ĉi malgrandan vorteton, kaj anstataŭe ili validigis kaj emfazis la vorton “sole”.

Laŭ la instruo de la mezepoka (kaj la nuna romkatolika) eklezio nia savo dependas de Kristo *kaj* de la papo, de la sanktuloj, de la institucionigita eklezio. La reformatoroj kontraŭ tio asertis, ke *sole* Jesuo Kristo estas nia savanto.

Laŭ la instruo de la mezepoka (kaj la nuna romkatolika) eklezio oni povas ekkoni la Vorton kaj la volon de Dio el la Biblio *kaj* el la eklezia tradicio. Kontraŭ tio la reformatoroj asertis, ke *sole* la Biblio estas la mezurilo de nia kredo kaj agado.

Laŭ la instruo de la mezepoka (kaj la nuna romkatolika) eklezio pro la graco de Dio *kaj* pro nia merito ni povos stari antaŭ la juĝo de Dio. Kontraŭ tio la reformatoroj asertis, ke ni rajtas fidi *sole* en la graco de Dio.

Fine laŭ la instruo de la mezepoka



József Farkas

(kaj la nuna romkatolika) eklezio ni ricevas la pardonon de Dio per nia kredo *kaj* per niaj bonfaroj, per kiuj ni senkonfesiigas nin de niaj pekoj. Kontraŭ tio la reformatoroj asertis, ke *sole* per kredo ni povas ricevi la jam pretan kaj plenan pekardonon per la ofero de Jesuo Kristo.

La popoloj de la reformacio kun feliĉa konscio devas kredi, ke la kvarfoja “kaj”, la ekleziaj kaj homaj faktoroj, kiuj aldoniĝis al la donacoj de Dio – per nenio riĉigis la vivon de la eklezio. Kontraŭe: unue la aldoniĝoj ombrigis la donacojn de Dio, kaj poste ankaŭ ili mem senfortiĝis. Ankaŭ inverse estas valida tiu ĉi vereco: kiam la popolo de la reformacio per forta

kredo konfesas, ke sole Kristo estas nia Savanto, sole el la Biblio sonas aŭtentike la savanta vorto de Dio, sole el graco kaj sole per kredo ekzistas savo – per tiu ĉi kredkonfeso ne nuligas, kontraŭe, metas al la Dio-indikita loko la eklezion, la magistratojn de la eklezio, la tradiciojn de la eklezio kaj la bonfarojn, kiuj naskiĝas el danko. Ni vidu tiun ĉi verecon/justecon en du terenoj de la antaŭe citita kvareco.

Kiam malaperas la “kaj”,
nome kiam ne Kristo
kaj la eklezio savas,
tiam estos *vera eklezio*
la eklezio.

Ĉar sole Jesuo Kristo savis nin – kaj tiel triumfe, ke “neniu povas eligi nin el liaj manoj” – pro tio ne estas necesa kaj ankaŭ ne estas ebla, ke la eklezio, kiel “sav-instituto”, memlaŭdu kiel kunlaboranto de la savado. Se la eklezio liberiĝas de tiuj mem-elektitaj taskoj kaj memlaŭdoj, tiam ĝi estos taŭga plenumi sian taskon/mision. Kiam malaperas la “kaj”, nome kiam ne Kristo *kaj* la eklezio savas, tiam estos *vera eklezio* la eklezio. Ni komprenas, kiel malfacile estas al la ore-velure-vestita, “sole savanta” eklezio transformiĝi al la silente kaj malriĉe servanta eklezio de

la silente kaj malriĉe servanta Kristo. Samtempe kun ĝojo ni spertas, ke la diversaj eklezioj (inter ili jam ankaŭ la romkatolika eklezio!) pli kaj pli klare komprenas, vidas, ke la *servanta* eklezio estis la penso de Jesuo Kristo, kaj ne la *savanta* eklezio.

Same: ĉar sole la Biblio estas la fonto kaj la mezurilo de la ekkono de la volo de Dio, por tio ne necesas kaj ankaŭ ne eblas, ke la “kristanaj tradicioj” (la ekleziaj kutimoj, liturgioj, katekismoj) protektadu super la Biblio. En la sana protestantismo ĉiujn tradiciojn oni tiras en la lumon de la pli kaj pli bone komprenita Vorto kaj tie kontrolas ĉiujn tradiciojn. Kaj ankaŭ tie ĉi validas: se elfalas la malgranda “kaj”-vorto, kiu kunigas la Biblion kaj la tradiciojn, kaj sole la Biblio gvidas niajn pensojn, tiam vigliĝas vere la tradicio: la Biblio-tradukado, la studado de la katekismo, la liturgio kaj la predikado.

Per tio ni servas plej bone la antaŭeniradon de la mond-kristanismo kaj la ekumenan movadon, se fidele ni kredas la ankaŭ hodiaŭ validan kredkonfeson de la reformacio.



La artikolo estis publikigita unuan fojon la 29an de oktobro 1967 en hungara reformita gazeto.

Kiel mi nomu vin?

Julia Sigmond, IT/RO

*Kiu ne vidas, tiu estas blinda.
Kiu ne aŭdas, tiu estas surda.
Kiu ne parolas, tiu estas muta.
Kiu ne amas, tiu estas?*

Ne ekzistas vorto por tiu persono. Oni diras, ke li/ŝi estas senkora, aŭ ŝtonkora. Eble tion, ke li/ŝi estas sensenta.

Eĉ unu vorto ne povas esprimi, fakte kion ĝi signifas.

Kiel la vortoj blinda, surda, muta, perfekte komprenigas, ke temas pri homo nevidanta, neaŭdanta, neparolanta.

Multfoje mi pensadis pri tiu fenomeno, sed solvi la misteron neniam mi povis. Ĝi similas al nesolveblaj enigmoj. Vane mi cerbumas, la tasko estas nesolvebla.

Oni diras, ke ekzistas tiuj, kiuj tiel naskiĝas.

Nome, kiam naskiĝas nedezirata infano, neniuj ĝojas pro ĝi, neniuj amas ĝin, eĉ se ĝi naskiĝas kun la am-kapablo, ĉi tiu kapableco ne povas evolui en ĝi.

La kapablon de am-sciigado – laŭ mi -, dum plenkreska aĝo perdas la homoj, konsekvence de trompiĝoj, kiam la am-senton anstataŭas la malamo.

La plej trista estas eble la manko de amo en olda aĝo, kiam alproksimiĝante al la fino de la vivo, iu ne plu kapablas ami.

En ĉiuj okazoj por mi estas nek komprenebla nek perceptebla: kiel eblas

vivi sen amo?

Ĉu ekzistas floro, kiu havas nek koloron nek odoron?

La blankaj estas la plej bonodoraj!

Neniam mi aŭdis pri birdoj, kiuj ne kapablas kanti.

Kiel povas vivi homo, se li/ŝi ne povas ami?

La koro de tiu homo sensone tintas-gongas.

Ne ekzistas vorto nomi tiun homon.

Ekzistas nekuraĵeblaj malsanoj. Jam de jardekoj aŭ jarcentoj, miloj da esploristoj serĉas la antidoton de tiuj malsanoj.

Kaj ili ne trovas ĝin.

Ĉu mi povas nomi tiun homan senton malkapablon, se iu ne kapablas ami: malsano?

Kaj ĉu ekzistas “scienculoj” kiuj serĉas la antidoton de tiu “malsano”?

Aŭ ĉu ankaŭ ĝi restos sur la listo de nekuraĵeblaj malsanoj?

Kiam lernos ĉiuj homoj la novtestamentan instruon: “Amu vian proksimumon, kiel vin mem!”

Resaniĝon mi deziras al ĉiuj miaj ami-nekapablaj homfratoj!



Dio en la Hussein najbaraĵo

de Brian Burns

Tradukis Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Ĉi tiu artikolo de Brian Burns aperis en la revuo Alliance Life (Alianca Vivo), de novembro/decembro 2016. Tradukita kaj publikigita kun afabla permeso. /VG

Ocidenta vento blovas forte super la ebenaj tegmentoj. Ĝi originas el la Mediteraneo. Ĝi verŝas pli multe de sia akvo sur la najbaran landon Israelon antaŭ ĝi atingas la dezerton kiu ĉirkaŭas la polvan urbon kie estas nia hejmo en Jordanio.

La Spirito de nia Sinjoro similas al tiu forta vento — movante, liberigante, renversante. Antaŭ miloj da jaroj en ĉi tiu lando, Dio Mem efektivigis Sian veran Ĉeeston super la Arkeo de la Interkonsento. La Sinjoro de la universo ŝvebis super skatolo farita de homaj manoj! Dio vere transloĝiĝis al la najbaraĵo kiam Li faris konata Sian Ĉeeston en la Templo. Plue, Li nuntempe alvokas nin al la Templo. Kia miraklo ke la Spirito de la Sinjoro loĝas inter ni! Li alvokas nin ke ni transloĝiĝu al la malfacilaj lokoj de la mondo.

en la parto plej malfacila de la urbo. Ni trovis ke la loko kie la plej multe da siriaj infanoj al kiuj mankas la instruado estas ankaŭ la loko kun plej multe da malriĉeco kaj krimo. Ĵus kiam la lasta kristana familio forloĝiĝis el la islama najbaraĵo ni transloĝiĝis tien. Ni aĉetis domon kaj traformis la dormĉambrojn al klasejoj kie ni nuntempe havas 147 lernantojn.



La lernejo

Patro de la senpatraj

Vi jam certe scias multe pri la siriaj rifuĝintoj. La Alianca Preĝejanaro de Mafraq, Jordanio estas eletendanta la brakon al siriaj rifuĝintoj ek de kiam ili unue alvenis en 2011. Antaŭ du jaroj, la preĝejanaro decidis komenci lernejon


“Ni bezonas montri amon al ĉi tiuj infanoj,” deklaras nia direktoro, Egab. Antaŭ ol ili foriris el Sirio, niaj lernantoj vidis aferojn kiujn infano neniam devas vidi. Multaj inter ili perdis ankaŭ gepatrojn kaj geparencojn .

Egab estas patro de la senpatruuloj. Li naskiĝis en ĉi tiu polva urbo Mafraq, kaj li kredas ke lia pastreco signifas helpi infanojn ricevi ion de sia perdita infaneco. La pasintan jaron de instruado por ke la infanoj amuziĝu li faris okazaĵojn por porti ilin al la bestoĝardeno, infana muzeo, romiaj ruinoj, kaj malgranda amuza parko.

Kiam la aŭtobuso plena de geinstruistoj alvenas ĉiu-tage, la infanoj kiuj atendas frue, ekscitite kriegas, "Egab!" Kvankam la rifuĝintaj infanoj kaj iliaj gepatroj scias ke la Alianca Preĝejanaro komencis la lernejon, ili ne nomas ĝin per tiu nomo. Ili nomas ĝin "la Lernejo de Egab." Ĝi estas establita ĉirkaŭ persono, ne institucio.

Ne sen espero

Unu el la sepjaraj lernantoj, Salaam, tre amas la lernejon kaj ne deziras perdi ĉe unu tagon tie. Kiam ŝiaj gepatroj alvenis por registri ŝin la pasintan jaron, la klasoj jam estis plenaj. Egab ne deziris



Gelelantoj kaj Egab



Salaam, 7-jarulino

rifuzi ŝin, ĉar li sciis ke tio rompus ŝian koron.


Egab estis vizitinta la familion antaŭe kaj li sciis ke ili estas tre malriĉaj. Ili ne posedis kion ili bezonas por la vintro kaj Egab ofte alportis al ili pakaĵojn de nutraĵo. Li sidadis kaj interparolis kun ili en ilia apartamento de unu ĉambro, ĉambro plena de fumo de la patrino de Salaam ĉar ŝi longdaŭre fumis.

Kiam Egab vidis la oficialajn dokumentojn de la familio dum la registro, li eksciis ke la patro de Salaam naskiĝis en 1926. Ĝis tiam Egab pensis ke la viro estas ŝia avo aŭ eble ŝia praavo. Kiel estus eble ke viro de plu ol 90 jaroj povus esti geedziĝinta kun virino de ĉ. 20 jaroj? Sed tio estas la vero. Salaam naskiĝis de lia dua edzino, kiu, same kiel ŝia edzo, estis senlabora. La familio rapide malsupreniris al malriĉeco.

Meze de la printempa semestro, 20 tagojn post kiam la patrino de Salaam naskis la fratineton de Salaam, la familio vekiĝis kaj trovis ke la patrino de Salaam estis mortinta. Ili opinias ke ŝi

mortis pro sango venenita. Salaam kaj ŝia nove naskita fratino troviĝis en tre malfacila situacio. Sen patrino kaj kun maljuna patro, Salaam kaj la infaneto estus edukitaj de sia pliaĝa frato de la unua edzino, kiu havas pli ol 60 jarojn.

Egab timas pri ilia situacio, sed ili ne estas sen espero. La saman tagon kiam ŝia patrino mortis, la instruistino de Salaam, unu el la jordanianoj de la alianca preĝejanaro, alportis iujn aliajn lernantojn kaj vizitis la familion por funebri kun ili.



Egab kal la edzino Heba

Egab estas patro de la senpatruloj. ... kaj li kredas ke lia pastreco signifas helpi infanojn rericevi ion de sia perdita infaneco.

Unu semajnon poste, Salaam estis denove en sia preferata loko: la lernejo. Mi eksciis tion kiam mi estis en la oficejo de la lernejo. “Ĉu vi deziras ke mi voku ŝin?” demandis Egab. Li elvokis ŝin el ŝia klaso al la oficejo. Li kliniĝis al la nivelo de ŝiaj okuloj kaj demandis, “Kiel vi fartas?” Ŝi komencis plori, kaj kiam li proponis ĉirkaŭprenon, ŝi alkroĉiĝis al lia kolo dum kvin minutoj. Egab kaj lia edzino, Heba, la sekretariino de la lernejo, gvidas la lernejon kun disciplino kaj amo.

Salaam deziras fariĝi instruistino kiam ŝi plenaĝiĝos.

Lia konsola ĉeesto

Dio estas transloĝiĝinta al la najbaraĵo — al la malfacila najbaraĵo de Al Hussein — ne kiel institucio sed kiel persono, pli ĝuste la popolo de Dio.

El ĉiuj lokoj de la urbo, la okcidenta vento blovas plej forte ĉirkaŭ la lernejo. Ĝi daŭre rememorigas min pri la Spirito de Dio Kiu loĝas en ni.

La nomo Egab signifas “akcipitro” en la araba lingvo. Al ĉi tiuj siriaj infanoj kiuj spertis tiom da traŭmo, Egab estas kiel la Ĉeesto de Dio ŝvebante super ili.

Per la helpo de malavaraĵoj amikoj ni povis aĉeti domon, transformis ĝin al lernejo, konstrui ludejon kaj nuntempe konstrui trian etaĝon por ricevi pli da lernantoj.

“Infanetoj, ni amu, ne laŭ vorto nek laŭ lango, sed laŭ faro kaj vero.” (1 Johano 3,18)



Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas?

Prelego okaze de la KELI-kongreso 2016 en Bratislava

Siegfried KRÜGER, DE

La rezulto post serĉado de la kongrestemo inter la estraranoj estis la supra rubriko. Pli poste mi rimarkis, ke tio estas biblia demando en Agoj 8,30.

Hazarde en biblia raport-gazeto mi trovis kontribuon de la german-regiona episkopo d-ro Ulrich Fischer al la temo kaj tio kaptis min. Okaze de vizito ĉe li lernejoj infanoj ankaŭ demandas lin pri lia plej ŝatata biblia historieto. Lia respondo estas la rakonto de la evangelisto Filipo en Agoj 8,30.

Li renkontas en dezerto ĉareton, en kiu vojaĝas la trezoristo de la reĝino Kandake, kiu legas en rulskribaĵo, aĉetita en Jerusalemo. Li ĵus legas el la Jesaja-libro la kanton pri la justula diservisto. Sekvas la dialogo inter Filipo

kaj la trezoristo: *Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas?* kaj ties bapto. (Vidu sube la tekston de Agoj 8,26-39)



26 Sed anĝelo de la Eternulo parolis al Filipo, dirante: Leviĝu, kaj iru suden ĝis la vojo, kiu kondukas de Jerusalemo al Gaza; tio estas dezerto. 27 Kaj li leviĝis, kaj ekiris; kaj jen viro, Etiopo, eŭnuko, potenculo sub Kandake, reĝino de la Etiopoj, kaj kiu estis super ŝia tuta trezoro, jam venis al Jerusalemo, por adorkliniĝi; 28 tiu vojaĝis returne, kaj, sidante en sia ĉaro, legis la profeton Jesaja. 29 Kaj la Spirito diris al Filipo: Aliru, kaj aliĝu al tiu ĉaro. 30 Kaj Filipo alkuris, kaj aŭdis lin legi la profeton Jesaja, kaj diris: **Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas?** 31 Kaj tiu diris: Kiel mi povas, se neniu min gvidas? Kaj li petis Filipon, ke li supreniru kaj sidiĝu kun li. 32 La peco de la Skribo, kiun li legis, estis jena: Li estis kondukata kiel ŝafo al la buĉo; Kaj kiel ŝafido muta antaŭ sia tondanto, Li ne malfermis sian buŝon; 33 En lia humiliĝo lia juĝo estis deprenita; Pri lia generacio kiu rakontos? Ĉar lia vivo estas prenita for de la tero. 34 Kaj la eŭnuko responde al Filipo diris: Mi petas vin, pri kiu parolis la profeto ĉi tion? ĉu pri si, aŭ pri iu alia? 35 Kaj Filipo malfermis sian buŝon, kaj komencante de tiu Skribo, predikis al li Jesuon. 36 Kaj dum ili iris sur la vojo, ili alvenis al iu akvo; kaj la eŭnuko diris: Jen estas akvo; kio malhelpas min baptiĝi? 37 Kaj Filipo diris: Se vi kredas per via tuta koro, tio estas permesata. Kaj li respondis: Mi kredas, ke Jesuo Kristo estas la Filo de Dio. 38 Kaj li ordonis, ke la ĉaro haltu, kaj ili ambaŭ malsupreniris en la akvon, Filipo kaj la eŭnuko; kaj li baptis lin. 39 Kaj kiam ili supreniris el la akvo, la Spirito de la Eternulo forkaptis Filipon; kaj la eŭnuko ne plu lin vidis, kaj li iris sian vojon, ĝojante.



Ĉi tiu teksto diras esencon pri la misia provokado de nia eklezio en la 21a jarcento.

La episkopo vidas sennombrajn homojn, kiuj veturas tra nia tempo en siaj vivkaleŝoj kun legaĵo, kiu tro multe postulas de ili. La Biblio ŝajnas al ili kiel libro kun sep sigeliloj. Ili atendas homojn, kiuj demandas ilin: *Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas?*

Ili atendas homojn, kiuj malfermas al ili la tekstojn de ilia vivo kaj la tekstojn de la Biblio. Ni bezonas homojn kiel Filipino, kiuj serĉas pacience la parolon kun la demandantoj. La tekstoj legindaj ne nur estas tiuj de la Biblio, sed ankaŭ tiuj de la vivo. Kredo estas legata kaj interpretita vivo.



Al ĉiuj, kiuj interpretas la vivon el la kristana kredo, malfermiĝas vasta horizonto, kiu donas orientiĝon. Pro tio la interpreto de la Biblio kaj de la vivo ne estas disigeblaj sed apartenas kune.

Komprenante la tekstojn, ankaŭ la trezoristo malkovris novan dimension de la vivo kaj li povis diri: Kio malhelpas min baptiĝi?

Al li malkaŝiĝis vereco, kiun li ne mem povas diri al si. Lia koro estas malfermita. Li lernas la skribon kaj la vivon nove legi. Kaj tio ĝojigas lin kaj “li iris sian vojon ĝojante”

La trezoristo legis la profeton Jesaja el multekosta rulskribaĵo (manskribita). Li ne estis malriĉa, nigrulo, eŭnuko kaj klerecmalsata. Antaŭ 2000 jaroj li estis survoje 4000 kilometrojn inter Addis Abeba kaj Jerusalemo, legante la profeton Jesaja, vivinta 700 jarojn antaŭ Kristo. Mirakle aktuala: La tombo de Filipino estus trovita de arkologoj en 2011 en Hierapolis. (Ĉu tombo de la evangelisto aŭ de la apostolo?)

Filipo estas unu el la sep unuaj diakonoj de la kristanismo, tute ekzakte de la historio de la unua kristana

Pri la rulskribaĵo Jesaja 52

Dio prezentas sian serviston.

13 Jen Mia servanto havos sukceson, li altiĝos kaj gloriĝos kaj staros tre alte. 14 Kiel multaj estis terurigitaj, rigardante vin (tiele lia aspekto estis malbeligita pli ol ĉe ĉiu alia kaj lia eksteraĵo pli ol ĉe iu ajn homo), 15 tiel li saltigos pri si multe da popoloj; reĝoj fermos antaŭ li sian buŝon, ĉar ili vidos ion, kio ne estis dirita al ili, kaj ili rimarkos ion, pri kio ili ne aŭdis.

Pri la rulskribaĵo Jesaja 53

Ĝi raportas pri katastrofo: Homo devas senkulpa suferi kaj malestimata morti. Sed Dio turnis la malbonon al bono. La plej akra kontrasto inter la ago de Dio kaj la ago de homoj al la servisto de Dio.

1 Kiu kredus al tio, kion ni aŭdis? kaj super kiu malkaŝiĝis la brako de la Eternulo? 2 Ĉar li elkreskis antaŭ Li kiel juna branĉo kaj kiel radiko el tero senakva; li ne havis staturon nek belecon; ni rigardis lin, sed li ne havis aspekton, per kiu li plaĉus al ni. 3 Li estis malestimata kaj evitata de homoj, viro suferanta kaj malsana; kaj kiel iganta deturni de li la vizaĝon, li estis malestimata, kaj li havis por ni nenian valoron. 4 Vere, niajn malsanojn li portis sur si, kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis; sed ni opiniis lin plagita, frapita de Dio, kaj humiligita. 5 Tamen li estis vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis. 6 Ni ĉiuj erarvadis kiel ŝafoj, ĉiu iris sian vojon; kaj la Eternulo ĵetis sur lin la kulpon de ni ĉiuj. 7 Li estis turmentata, tamen li humiliĝis kaj ne malfermis sian buŝon; kiel ŝafido kondukata al buĉo kaj kiel ŝafo muta antaŭ siaj tondantoj, li ne malfermis sian buŝon. 8 De malliberigo kaj de juĝo li estas prenita; kaj pri lia generacio kiu rakontos? De sur la tero de vivantoj li estas fortranĉita, pro la kulpo de mia popolo li estas frapita. 9 Inter malbonaguloj oni donis al li tombon, inter riĉuloj post lia morto, kvankam li ne faris maljustaĵon kaj trompo ne estis en lia buŝo. 10 Sed la Eternulo volis tiel lin turmenti. Kiam lia animo estos preninta sur sin elaĉetan punon, li vidos idaron, li longe vivos, kaj la intenco de la Eternulo sukcesos per lia mano. 11 La laborfrukton de sia animo li vidos, kaj satiĝos. Per konigo de li Mia virtulo-servanto virtigos multajn; kaj iliajn pekojn li portos sur si. 12 Tial Mi donos al li multajn kiel lian parton, kaj la potenculojn li dividos kiel akiron; pro tio, ke li elmetis sian animon al la morto kaj estis alkalkulita al krimuloj, dum li portis sur si la pekon de multaj kaj petis por la krimuloj.

komunumo, kunvenanta en Jerusalemo. Li estis enoficigita de Petro kaj ĉeestis kun la apostoloj. Lia morto estis martira.

La Di-bildo kaj la Hom-bildo en Jesaja-libro:

Dio

- prezentas sian serviston (52,13 ff)
- montras sian brakon (53,1)
- li elkreskigas la serviston antaŭ siaj okuloj (53,2)
- ŝajne li estas batinta la serviston (53,4)
- Li ĵetis sur lin la kulpon de ni ĉiuj (53,6)
- al Li plaĉis la batita servisto (53,10)



La Di-servisto

(La kanto desegnas precizan bildon de la di-servisto.)

Li

- estos granda kaj elstaranta (52,13)
 - miregos 52,15)
 - portis nian malsanon (53,4)
 - ne malfermis sian buŝon (53,7)
 - estas justa (53,10)
 - donis sian vivon kiel forigo de la ŝuldo (53,10)
 - virtigos multajn (53,11)
 - la kulpon li portos sur si (53,11)
 - li portis sur si la pekon de multaj (53,12)
 - petis por la krimuloj (53,12)
- savas lin, kiu fordonas sian vivon (53,11)
 - promesi plenumon al la servisto, kiu portis sur si la pekon kaj petis por la krimuloj (53,11 ff)

Ni

- ne volis rigardi lin (53,2)
- li ne plaĉis al ni (53,2)
- Li estis malestimata kaj ni detenis nin (53,3)
- ni ne ŝatis lin (53,3)
- ni opiniis lin plagita, frapita de Dio (53,4b)

Dio estas la Sinjoro de la historio kaj plenumas la savon pro la sufero kaj morto de la Di-servisto je la fino de la tempo.

Jesuo en la sinagogo de Nazaret

16 Kaj li venis al Nazaret, kie li estis edukita; kaj laŭ sia kutimo li eniris en la sinagogon en la sabata tago, kaj stariĝis, por legi. 17 Kaj estis donita al li libro de la profeto Jesaja. Kaj, malferminte la libron, li trovis la lokon, kie estis skribite:

18 La spirito de la Eternulo estas sur mi,

Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj;

Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj

Kaj vidpovon al blinduloj,

Por meti la vunditojn en liberecon,

19 Por proklami favorjaron de la Eternulo.

20 Kaj kunvolvinte la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, li sidiĝis; kaj la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis. 21 Kaj li ekparolis al ili: Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj.



- ni erarvadis (53,6)
- li estis turmentata kaj ne malfermis sian buŝon (53,7)
- de sur la tero de vivantoj li estas fortranĉita (53,8)
- pro la kulpo de nia popolo li estas frapita (53,8)
- ni mortigis lin (53,9)
- Ni estas kulpintoj al kiuj estas pardonita

La suferanta kaj reganta diservisto sendube estas plenumita en Jesuo Kristo.

Tiu servisto efikas justecon por multaj, ĉar li portas iliajn pekojn. La diservisto ebligas pardonon por ĉiuj.

Kiu estas la diservisto? Tion demandas la trezoristo leginte la Jesajaĵon. Filipo montras al li la serviston Jesuo, kiu portis la pekojn de la tuta mondo. Jesuo estas la suferanta kaj reganta servisto.

Filipo kaj la trezoristo malfermas ankaŭ por mi vastan horizonton kaj gvidis min al la radikoj de nia kredo.

Hejmenveninte tiu temo, okaze de la KELI-kongreso 2016 en Bratislavo, okupis min ankoraŭfoje ĉi tiu Jesajaĵo per Luko 4, 16 – 21. Ĉi-foje estas Jesuo, kiu legas la saman rulskribaĵon.

Ĉi tiuj vortoj estas Lia proklamo, ili estas Lia programo. La evangelio laŭ Luko raportas, kiel Jesuo plenumas la promeson.

Vidu ankaŭ Jesaja 61,1 kaj la sekvontajn versiklojn. La interpreto de ĉi tiuj versikloj per Jesuo estas grava modelo por la kristano ekzegezo de la Malnova Testamento.

Same kiel Jesuo vivigis la vortojn de la profeto Jesaja, ni nun estas invititaj viviĝi ilin en nia vivo.

☪

Protestantismoj

Dua parto de prelegserio — La Biblio kaj la Fido

Philippe COUSSON, FR

En tiu dua parto, mi daŭrigos per du gravaj personoj inter la Reformatoroj, Kalvino kaj Zwingli kaj tra ili mi aludos du gravajn temojn en protestantismo, nome Sola Gratia (sole graco) kaj la sakramentoj. Mi prezentos samtempe la ekleziojn post ili aŭ kontraŭ ili.

Johano Kalvino (Jean Calvin, Jehan Cauvin, Johannes Calvinus), Noyon, Norda Francio, 1509, Ĝenevo, 1564, estis filo de eklezia funkciulo. Jam 12jara li fariĝis registristo de la episkopo, estis tonsurata kaj eĉ fariĝis kapelano. Li studis, protektata de riĉa burĝa familio, en Parizo ie kie li havis kiel instruiston Mathurin Cordier kiu poste fariĝis protestanto kaj instruis en Laŭzano kaj Ĝenevo, kaj aliloke kie studis apud li Ignacio de Lojola. Poste li studis en Orléans kaj Bourges kie li lernis la grekan. Li diplomiĝis pri juro kaj publikigis sian unuan libron, kometon pri Seneko.

En 1533 per la influo de sia kuzo Olivétan li konvertiĝis al protestantismo: “*Dio, per subita konvertiĝo mastris kaj obeigis mian koron.*” Reveninte en Parizon, li verŝajne verkis la paroladon de la nova rektoro de la Universitato, kiu postulas religian reformon kaj kaŭzis skandalon. Ambaŭ devis fuĝi, la rektoro al Svislando kaj Kalvino tra divresaj lokoj en Francio (li forlasis tiam siajn ekleziajn enspezojn).



Johano Kalvin /Holbein

Fine ili troviĝis en Bazelo, urbo de la reformatoro Okolampado. En 1536 aperis la unua eldono de lia *Institucio de la kristana religio*. Dezirante iri al Strasburgo li devis trapasi Ĝenevon kie Guillaume Farel konvinkis lin restadi. En 1538 pro moralaj kaj liturgiaj diskutoj ambaŭ estis pelitaj el Ĝenevo. Farel iris al Neuchâtel kaj Kalvino al Strasburgo kie li prizorgis la francajn rifuĝintojn. Li publikigis duan eldonon de la *Institucio* kaj komentarion pri la epistolo al la Romanoj. Li subskribis la konkordon de Wittenberg kaj defendis la Konfesion de Aŭgsburgo en Ratisbono (1540). Li edziĝis al Idelette de Bure.

Ĉar la kardinalo Sadoletto sendis leteron al la urbaj instancoj de Ĝenevo, tiuj fine decidis peti de Kalvino ke li

verku la respondon al tiu letero, kion li faris. Ĝenevo denove vokis lin reveni. Li ne volis sed ili sukcesis decidigi lin. Tiam li fondis la religian kaj moralan vivon de Ĝenevo, verkis liturgion kaj katekismojn laŭ la modelo de la strasburgaj de Bucer. Li tiom predikis ke profesia skribisto estis dungita por noti la predikojn.

Li havis kontaktojn kun Bullinger kun kiu li subskribis la *Consensus Tigurinus* kiu unuecigas la poziciojn de la ĝenevaj kaj zurikaj protestantoj. Li ankaŭ havis kontaktojn kun Thomas Cranmer, kaj pro la persekuto dum la regado de Mary Tudor li akceptis rifuĝintojn kaj tio influis la ceteron de la Anglikana Reformacio. En 1559 aperis la lasta latina eldono de la *Institucio*. Li fondis en Ĝenevo la kolecion kaj la akademion kiun estris Théodore de Bèze. Ĝenevo sendis al Francio inter 1555 kaj 1562 pli ol 100 pastorojn. En 1564 li mortis pro malsano kaj lacego.

Tiu kiu sukcesis kapti lin por Ĝenevo estis Guillaume Farel (Gap 1489 – Neuchâtel 1565). Post studoj en Parizo kie li konatiĝis ankaŭ kun Lefèvre d'Étaples kaj la grupo de Meaux ĉirkaŭ la episkopo Briçonnet, li estis kondamnita kaj iris prediki en sia denaska regiono kaj en Svislando. Li multe vojaĝis, ankaŭ ĉe la Valdanoj en Piemonto. Li konatiĝis kun Pierre Viret kiu poste fariĝis la reformatoro de Laŭzano. Li restis en Ĝenevo kie li konvinkis la urban konsilantaron transiri al la Reformacio. Post la forpelo el Ĝenevo li fariĝis la reformatoro de Neuchâtel.

La posteulo de Kalvino en Ĝenevo estis Théodore de Bèze (Vézelay 1516 – Ĝenevo 1605). De nobela familio li studis en Bourges kaj Orléans kun luterana profesoro. Post malsano en Parizo li konvertiĝis en 1548, li iris al Ĝenevo kaj Laŭzano por instrui ĉefe la grekan. En 1559 li fariĝis la rektoro de la ĝeneva akademio. Li estis diplomato, verkisto, poeto (multaj psalmoj). Li prezidis la sinodon de La Rochelle kie estis adoptita la franca reformita konfesio. Li havis personajn kontaktojn kun Francisko de Salles.

Se ne estus preparita la tereno de humanismo kaj de la aliro al la tekstoj, se ne estus la ideoj de Luther alvenintaj en Francion, tio eble ne okazus. Eĉ antaŭ Luther, Lefèvre d'Étaples en 1512 alvenis komentante la epistolojn de Paŭlo al la pravigo per la fido. Kiam li restis protektita li povis daŭrigi sian laboron sed post la unuaj ŝtiparaj mortigoj en Parizo Lefèvre fuĝis al Strasburgo. Krom Farel en tiu grupo estis ankaŭ Olivétan, kuzo de Kalvino, kiu tradukis la Bibliion en la francan kaj estis elementa instruisto en diversaj lokoj en Svislando kaj en la valdanaj valoj.

La graco, kiu estis la ĉefa moto de tiuj, vekis krom espero kaj konvertiĝoj, ankaŭ disputojn. La savo nur per graco ne estas novaĵo teologia sed ĝi estas esenca en protestantismo.

La pozicio kiun oni nomas kalvinana estis difinita longe post lia morto, dum la sinodo de Dordrecht 1618-1619. La ĉefaj karakterizoj de tiu pozicio estas resumebla per anglalingva akronimo: TULIP (*Total depravity, Unconditional election, Limited atonement, Irresistible*

grace, Perseverance of the saints) kompleta malvirto, senkondiĉa elekto, limigita elaĉeto, nerezistebla graco, persisto de la sanktuloj.

Multaj demandoj aperis rapide. Kio estas la parto de la homo en sia savo? Kio estas lia kapablo?

Iama lernanto de Bèze, Jacobus Arminius (Jakob Harmenszoon) (1560-1609) akceptas nur parton de tiu “ortodoksa” kalvinana pozicio: kompleta malvirto, elaĉeto destinita por ĉiuj, rezistebla graco kaj kondiĉa elekto, kondiĉa certiĝo pri savo. La remonstrantoj, posteuloj de Arminius, en 1610 formulis 5 artikolojn: savo kondiĉe ligita al la fido permesita per la antaŭmetita graco, elaĉeto por la tuta homaro sed efika nur por la kredantoj, sen la Sankta Spirito neniu povas pozitive respondi, la graco de Dio estas la komenco, la daŭrigo kaj la plenumiĝo de ĉia bono, la kredantoj kapablas rezisti al la peko per la graco prezervitaj de Kristo.

Variaĵoj de tiu pozicio ekzistas, de Moïse Amyraut 1556-1664, de John Davenant 1576-1641 aŭ pli poste de John Wesley 1703-1791, de William Booth 1829-1912.

Aliaj variaĵoj ekzistas pri la supozata sinsekvo de la dekretoj de Dio pri la savo.

Estas en protestantismo ankaŭ pluraj pozicioj pri la signifo de la kruco. Ĉu venko de Kristo? Ĉu elaĉeto pagata? Al kiu? Satano? Dio? Ĉu ekzemplo de plena amo? Kaj kio pri la persisto de la kredantoj kaj pri la certeco de la savo? Kaj kial ne ĉiuj estus savitaj? Karl Barth diras ke universalismo (ĉiuj estas savitaj) estas nek pruvebla nek refutebla.

La tiel nomata komuna aŭ ĝenerala

graco estas la graco de Dio kiu permesas ke la mondo ne jam estu plena ĥaoso. Bonhoeffer parolis pri la graco kiu kostas.

Charles Haddon Spurgeon 1834-1892, brita baptista kalvinana predikisto diris: “*Ho, Dio, voku viajn elektitojn! Kaj ankaŭ elektu aliajn!*”

La eklezioj kiuj sekvis la predikojn de Kalvino ĝenerale funkcias kun la sistemo presbitera-sinoda. Por protestantoj, la organizado de la eklezioj ne apartenas al ĝia naturo sed al ĝia bonfarto. Sekve ekzistas pluraj sistemoj. Krom la menciita, ekzistas protestantaj eklezioj kun episkopoj, ekzistas eklezioj kun aŭtoritato nur en la loka komunumo (kongregaciismo). La metodistoj havas propran sistemon nomatan konektiĝismo, kie lokaj grupoj konektiĝas. Ekzistas alia diferenco inter la diversaj eklezioj post Kalvino la rolo de la ŝtato en la vivo de la eklezioj.

Tio manifestiĝis rapide en Anglio per la fenomeno de puritanismo. Esence angla ĉe la komenco, ĝi poste fariĝis ĉefe amerika (Usono ne ankoraŭ ekzistis!).

La reĝino Mary Tudor (“Sanga Maria”) kiu volis reveni al katolikismo provokis la ekzilon de multaj kiuj rifugiĝis en kalvinajn terojn, ĉu Genevon ĉu aliloken. La traduko de la Biblio, “Biblio de Genevo” kaj la Libro de Martiroj estis de tie kaŝe disdonitaj en Anglion. Poste regis Elizabeta I, kiu malgraŭ la esperoj ne antaŭenpuŝis la kalvinajn ideojn kaj preferis mezan vojon persekutante la rifuzantojn. La nomo “puritano” venas de ilia rifuzo de la liturgiaj vestaĵoj, purigendaj el la pompo. Kiam alvenis la reĝo Jakobo 1a, kiu estis Jakobo 6a el Skotlando, ili esperis pri presbiteriana

tendenco, sed, ve!, daŭris la persekutoj. Multaj migris al Ameriko aŭ al kontinenta Eŭropo. Tamen okazis la civila milito kaj la parlamento kunvokis la Asembleon de Westminster en 1640. Cromwell favoris la puritanojn, sed revenis la monarkio kaj la persekutoj. Al Ameriko!

La puritanaj paroĥoj, ankaŭ nomitaj kongregaciaj, estis trafitaj de la Vekiĝoj kaj evoluis al metodismo, baptismo, kvakerismo, universalismo aŭ unitariismo.

En la amerikaj kolonioj estis multaj debatoj pri la rilatoj inter la ŝtato kaj la eklezio. Ekzemple en Massachusetts dum periodo la aliaj konfesioj estis persekutataj de la puritanoj.

En tiu medio aperis diskutoj pri demonologio kaj milenarismo.

Notinda el tiu puritana etoso estas la verko de la baptisto John Bunyan (1628-1688) verkita en karcerio, *La vojaĝo de la pilgrimanto*, alegoria romano.

Mi ankaŭ volas prezenti al vi teologon de la 20a jarcento kiu gravas ne nur en reformaciaj eklezioj. Karl Barth, bazelano (1886-1968). Post pastoreco en Svislando kie li subtenis



John Bunyan



Karl Barth sur germana poŝtmarko

la laboristajn sindikatojn, li estis profesoro pri teologio en Germanio, kiun li devis forlasi pro rifuzo de juro al Hitlero. Li partoprenis en la konsistigo de la Konfesanta Eklezio apud Niemöller kaj Bonhoeffer. Li estas fakte la ĉefa redaktanto de la deklaro de Barmen. Komence influita de la liberalistoj (von Harnack) li lasis kaj la liberalismon kaj la kristanan socialismon.

En sia verkego *Eklezia dogmatiko* li ĉefe pritraktas la finitecon de la homa estaĵo kaj la aŭtoritaton kaj aliecon de Dio.

Kvankam li ne ŝatis la terminon, lia teologio estis nomata "nova ortodoksio". La Biblio ne estas la Revelacio de Dio sed raporto pri tiu Revelacio. Ĝi estas nur atesto homa pri la Revelacio ĝis la Sankta Spirito rivelas Dion al la homa koro. Kelkaj posteuloj: Tillich, Bultmann, Niebuhr.

Kalvinanaj eklezioj troviĝas en multaj landoj kun propraj historioj, kiujn mi ne detalos. Mi simple indikos ke se ili havis originon iam en Skotlando, tiuj eklezioj nomiĝas presbiterianaj.



Daŭrigota

Plia aspekto okaze de la 500a datreveno de la Reformacio:

Martin Luther pregas novan kulturan lingvon

Karl Heinz SCHAEFFER, DE

Martin Luther [Marteno Lutero] naskiĝis en 1483 en Eisleben, kie li ankaŭ mortis en la jaro 1546. Post kiam preskaŭ trafis lin fulmo, li promesis solenan voton kaj sekve aliĝis al la ermitoj de Sankta Aŭgusteno en la urbo Erfurto. 1507 li estis ordinita kiel sacerdoto kaj ekstudis teologion. 1512 li doktoriĝis kaj fariĝis profesoro pri biblia interpretado ĉe la universitato de Wittenberg. Grava punkto en liaj prelegoj estis lia opinio, ke oni ne povas akiri la Dian gracon per propra agado, sed ke ĝi estas donaco, kiun la homo povas akcepti nur kun humileco.

Ĉefe, li serioze kontraŭis al iuj religiaj praktikoj kaj deklaroj, speciale kontraŭ la tiam kutimaj komercaj indulgenc-biletoj kaj eldonis en 1517 liajn famajn 95 tezojn pri la indulgenco. La celo estis, ke li volis instigi sciencan disputon pri la temo. La tezoj gvidis al granda publika eĥo kaj fine por li kaj siaj adeptoj al la t.n. proskribo, ĉar Lutero ne esprimis la postulatan kontraŭiron. Pro tio ŝajne kaptis lin lia suvereno, princelektisto Frederiko la Saĝulo, kaj alportis lin al la sekura burgo Wartburg. Tie li i.a. tradukis la Novan Testamenton en nova maniero en la germanan lingvon.

Post dek monata restado en la burgo revenis Lutero al Wittenberg kaj devis tie dum jaroj alfronti kontraŭ multaj malamikoj kaj atakoj el diversaj kampoj, dum li kaj eminentaj sekvantoj laboris por konstrui reformitan eklezion (i.a. por evoluigi germanan meson). Lutero skribis tiam sennombrajn verkojn pri teologiaj kaj politikaj temoj kaj laboris tie (kune kun kolegoj), ĝis la kompletigo en 1534, pri la kompleta traduko de la Biblio en la germanan. Tiu estis presita en la sama jaro en Wittenberg kaj rapide iĝis sensacia sukceso. Ĝis la morto de Lutero aperis pli ol 400 eldonoj!

Restas nun la demando, kial eblis tiu giganta sukceso post miljaraj tradukprovoj? La merito de Lutero estis, ke jam lia unua traduko estis farita en mirinda lingvo, kaj oni komprenas ĝin ankoraŭ hodiaŭ sen tradukado. Ni alrigardu nun pli detale lian



Parto de la 95 tezoj sur la kastela preĝeja pordo en Wittenberg
Fotis Karl Heinz Schaeffer

tradukadteknikon. Por Lutero estis unu – sed tute ne ununura – tradukbazo la en la eklezio uzata latina *Biblio Sacra Vulgata*. La komenco de la Genezo tekstas tie: *In principio creavit Deus caelum et terram / terra autem erat inanis et vacua / et tenebrae super faciem abyssi et spiritus Dei ferebatur super aquas.* – Certe estis dum la tempo de Lutero nenia vorto netradukita tie, sed li havis por kelkaj vortoj siajn malfacilaĵojn por elekto, ekzemple la vorton por “spiritus“. Ĝi ja signifas en tiu kunteksto “aero“, “spiro“, “vivo-spireto“, sed ankaŭ “suspiro“. En aliaj tradukoj oni trovas ankaŭ por ĝi “vento“. Lutero rimarkis al tio ĉi: “Vento en tiuj tagoj ankoraŭ ne ekzistis, do ĝi devas signifi la Sanktan Spiriton.“ Tiun aliron oni nur povas trovi genia. Lutero tradukis tre libere. Li ne gluiĝis al la latina, greka aŭ hebrea originaloj. Li orientiĝis je tio, kiamaniere la germana

lingvo estis parolata en la popolo. Laŭvorte li ĉiam demandis sin, ke oni devas rigardi, kiel la “patrino en la domo, la infanoj sur la stratetoj“ kaj la “normala viro sur la foirplaco“ estus dirantaj iun frazon, rigardante al iliaj buŝoj.

La bazo de la tradukarto de Lutero estis la Saksa kancelaria lingvo, ĉar estis penado por privenki la multajn dialektojn en la tradukado, kiuj estis parolataj en Germanujo. Taŭga komungermana tegmenta kultura lingvo ankoraŭ ne ekzistis. En orienta meza Germanujo setlantoj ekloĝis el multaj germanaj dialektregionoj. Sekve ekestis tie miksaĵo de lingvoj, kiu estis sufiĉe facile komprenata de ĉiuj germanoj. Al tiu miksaĵo Lutero apogis sin. Kune kun siaj propraj klopodoj aperis tiu lingvo, kiu estas nomata la komungermana lingvo nuntempe. Tiel Lutero povis pruvi, ke regionaj lingvoj povis esti taŭgaj por kulturlingvoj. ❧

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

5. majo

Kompatema Dio, benu la klopodojn de tiuj, kiuj sincere provas trovi unu la alian. Benu la kontaktojn inter la eklezioj kaj inter la diversaj religioj. Ni donu el nia riĉeco al aliaj kaj inverse.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74).
Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Preĝo
por
ĉiu
Tago

Jelly Koopmans-Schotanus

Vizito en Tajlando

Vojaĝraporto

Pavel Polnický, CZ

Komence de la nuna jaro mi planis viziti Tajlandon kaj kiam mi kontaktis lokan esperantiston, mi eksciis, ke ĝuste en la tagoj post mia alflugo, okazos en Bangkok semajnfina kursaro. Mi kompreneble volonte partoprenis kiel gasto. Lerni esperanton alveturis homoj el jenaj landoj: Tajlando – 7, Japanio – 5, Vjetnamio – 3, Hungario – 2, Francio kaj Germanio po 1. Komencantojn instruis Mark Starrs, aŭstralano longe vivanta en Tajlando, mezan grupon gvidis hungaro d-ro Márkus Gábor, prezidanto de Eŭrasia Kultura Centro kaj konversacian estris s-ro Usui Hiroyuki, japano laboranta nun en redakcio de El Popola Ĉinio.

Por mi estis interese, ke komencantoj lernis el lernolibro de slovako Stano Marček. Libron en tajan lingvon tradukis mia longjara amiko, ĉeĥo Mikuláš Nevan (eksa KKS de UEA) helpe de sia taja edzino Ticha. Por mi estis interese pro tio, ke flugante viziti Malazion, mi kunportis pakaĵon kun freŝe eldonitaj libroj. Kaj nun mi vidis, ke estas uzataj...

Komunan vespermanĝon partoprenis ankaŭ juna ĉiliano, vivanta nun daŭre en


Tajlando. Warut Bunprasert, juna organizanto de la aranĝo, kiu finis altlernejon, estas kristano kaj estos nova abonanto de Dia Regno kaj membro de KELI. Pri nia ligo interesiĝis ankaŭ s-ro Usui, japano, kiu diris al mi, ke lia edzino, bona esperantistino, estas protestantino kaj li promesis al mi, informi ŝin pri nia agado... Ni vidos, ĉu ŝi aliĝos al KELI...

Mi kunportis kaj disdonis kelkajn ekzemplerojn de Dia Regno.

☞

Sur la fronta paĝo vi vidas foton montrante la grupon de komencantoj kun Mark Starrs (staranta). La suba foto montras parton de meza grupo gvidata de d-ro Márkus Gábor.

Teksto kaj fotoj Pavel Polnický



Retrorigardo al la ekumenaj Bibliaj Tagoj 2017

Okazinte en Wittenberg

Raportas Karl Heinz SCHAEFFER, DE

Renkontiĝis en tiu ĉi jaro en ekumena etoso ĉ. 30 partoprenantoj en la urbo Wittenberg [Vitenbergo], la urbo, kie Martin Luther [Marteno Lutero] en la jaro 1517, do antaŭ 500 jaroj, publikigis siajn 95 tezojn pri la indulgenco. Ĉefa temo de la Biblia laboro tie estis la Epistolo de apostolo Paŭlo al la Galatoj. La spiritan laboron respondecis pastoro Wolfram Rohloff el Zöblitz, el la Ercmontaro. La muzika organizanto estis Stefan Lepping kaj la sekretario kaj trezoristo estis Rudolf Fischer.

Ĉar en Wittenberg oni rememoras dum la tuta jaro al la Reformacio en 1517, oni povis facile atingi gravajn lokojn de Reformacio kiel la domo de

Philipp Melanchthon [Filipo Melanĥtono], la kastelan preĝejon, en kiu troviĝas la tomboj de Marteno Lutero kaj Filipo Melanĥtono, kaj ankaŭ la enirpordo, al kiu Lutero fiksas siajn 95 tezojn je la 31a de Oktobro 1517. La domon de familio Lutero oni ne povis viziti, ĉar oni ankoraŭ renovigis ĝin. Post la vizito de Melankton-domo ni vizitis la ekspozicion de la pentraĵoj de pentristino Helga Ploetner, unu el la partoprenantinoj de la Bibliaj Tagoj.

La seminariejo por la tuta aranĝo estis en la luksa junulargastejo, kie ni laboris, kantis ĉiutage, bone manĝis kaj dormis sub unu tegmento, kaj de tie oni povis piede atingi ĉiujn okazaĵojn ekster la domo. Precipe al la preĝejoj por niaj



Esperantaj diservoj.

Tre impona estis vizito de 360° Panoramo de Yadegar Asisi kun la temo “Luther 1517“. En la interno oni rigardas al diaramo kun mezepokaj scenoj en Wittenberg, montrante bonajn imagojn al la vivo siatempa.

Menciinda estas ankaŭ la fervoja ekskurso al la urbo de Johann Sebastian Bach [Johano Sebastiano Baĥo] Leipzig [Lepsiko], kie ni aŭskultis koncerton de knaba ĥoro de Tomanoj en la fama Tomasopreĝejo. La ĥoro estis fondita

en la jaro 1212 kaj estas unu el la plej malnovaj knabaj ĥoroj en Germanujo kaj Eŭropo.

Pli detalan raporton oni povas legi en la nova Espero Katolika, kajero 1-3/2017.

Post 4 tagoj reiris ĉiuj partoprenintoj hejmen, certe plenaj de impresoj pri tio, kion ni ĉiuj travivis.



Teksto kaj foto Karl Heinz Schaeffer

67-a kongreso de KELI

7. – 14. aŭgusto 2017, Z Ö B L I T Z, Germanio

Temo: Fruktoj de la Reformacio

*Se Vi planas partopreni la KELI kongreson
ne forgesu rapide aliĝi !!!!*

1. KRONENBERGER Albrecht	Germanio	15. GAILLARD Samuel	Francio
2. STAMM Sieglinde	Aŭstrio	16. SCHAEFFER Karl Heinz	Germanio
3. ÅRADSSON André	Svedio	17. SCHAEFFER Hedwig	Germanio
4. ÅRADSSON Bengt Olof	Svedio	18. BIRTA Sabolciu	Rumanio
5. RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes	Hungario	19. ROHLOFF Wolfram	Germanio
6. POLNICKÝ Pavel	Ĉeĥio	20. COUSSON Philippe	Francio
7. CHRDL Petr	Ĉeĥio	21. LEUZE Ernst	Germanio
8. FISCHER O. Arnošt	Ĉeĥio	22. KOZ Christa	Germanio
9. STIER Gabriella	Rumanio	23. HOFMANN Gerhard	Germanio
10. POSPÍŠIL Václav	Ĉeĥio	24. KIEFER Anton	Germanio
11. SÜDLAND Norbert	Germanio	25. KLIMEŠ Pavel	Ĉeĥio
12. KRÜGER Siegfried	Germanio	26. KARBE Norbert	Germanio
13. OJASILD Endel	Estonio	27. KARBE Christiane	Germanio
14. OJASILD Joonatan	Estonio	28. FARKAS Antal	Rumanio



Franz-Georg RÖSSLER

14/5 1949 – 14/3 2017



F-G Rössler en 2008
/Fotis Rita Rössler-Buckel

La 17an de marto 2017 subite mortis 67-jar-aĝa Len sia hejmo en Dudenhufen (apud Speyer, Germanujo) Franz-Georg Rössler. Multaj el ni memoros lian orgenludadon dum Diservoj, ankaŭ kun propraj komponaĵoj, liajn lumbild-prelegojn pri historiaj personoj kaj eventoj kaj pri regionoj, liajn pentraĵojn, liajn librojn kaj broŝurojn. Li estis unu el la motoroj de Esperanto en sud-okcidenta Germanujo.

Por li ni petas pri la eterna vivo, kaj por lia edzino Rita Rössler-Buckel pri la forto de Dio en tiuj ĉi emoci-plenaj kaj tristigaj tagoj.

Albrecht Kronenberger

Vidu ankaŭ:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Franz-Georg_Rössler

*Ne scias mi, kiam mi mortos;
en juna aŭ maljuna aĝ’.
Sed timon mi nepre ne portos
ĉe l’ fino de mia vojaĝ’.
Ĉar kiam alvenos la horo,
sin vaste malfermos la pord’
de l’ domo de l’ Patro, kaj Kristo
min kaptos je l’ mano kun fort’.*

*Ne scias mi eĉ, ĉu mi mortos,
aŭ ĉu mia Reĝ’ kaj Sinjor’
sub sonoj de l’ lastaj trumpetoj
min prenos tuj kun Si al glor’.
Feliĉe, Sinjor’, Vi ja scias,
ĉar estas tro multe por mi!
Por mi restas sole la fido,
ke estos tre bone ĉe Vi!*

ADORU 643, 1 kaj 4

Ho Eternul', profunda ĝoj'

(originale verkita en Esperanto)



Ho E - ter - nul', pro - fun - da ĝoj' de l' hom - a - nim'!



Ho E - ter - nul', pro - fun - da ĝoj' de l' ko - ro!



fun - da ĝoj' de l' kor'!



1. Vi - a Spi - rit' ple - ni - gas min per Vi - a am',


2. Sur ĉi - a voj' so - na - das Vi - a me - lo - di'



kaj Vi - a Fil' per pa - co kaj li - be - ro.

fun - de en mi, a - kor - doj de la ĝo - jo.

Coda ad lib.



(kor'!)

Ha - le - lu - ja.

Ha - le - lu - ja.

HO ETERNUL', PROFUNDA ĜOJ' • M (Oh mein Papa): Paul Burkhard ĉ. 1927, 1939 en *Der schwarze Hecht*, 1950 kantita de Lys Assia, 1954 kantita de Lilli Palmer en *Feuerwerk*, © Copyright control • E (originale verkita kiel kontrafakturo): Albrecht Kronenberger 2017-02-12, semajnon post la prediko kun la temo *Ĝojo* okaze de la Bibliaj Tagoj en Luterurbo Wittenberg